

ESPERANTO

ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO DE ESPERANTO - LIGO EN ISRAELO (ELI)
P.K. 39004, TEL AVIVO
N-ro 65 - JULIO 1978

האספרנטו הישראלי

בטאון הליגה לאספרנטו בישראל
ת.ד. 39004, תל-אביב
העורך: אלכסנדר מנור
חוברת 65 - יולי 1978



Enhavo

Israelo- 30 jaroj de sendependeco	A. Manor	1.
30 jaroj de Israelo	A. M.	2.
Bab - El - Vad': H. Guri (trad. J. Kohen-Cedek)		4.
Israela scienco	H. Mašler	6.
Vivnivelo en Israelo	H. M.	7.
<u>JELI- angulo</u>		
Nia lando havas 30 jarojn	M. Bukofcer	9.
D-ro Imanuel Olsvanger	J. Kohen-Cedek	10.
Mia preĝo	I. Olsvanger	11.
Armlaro de Araboj	H.M.	12.
La flaŭro en Israellando	J. Ŝemer	13.
Jugverdikto: Ŝ. Melcer (trad. J. Kohen-Cedek)		14.
Kulinara angulo	J. Ŝ.	16.
Vortareto	J. Ŝ.	17.
Esperanto-kurso en mezlernejo	A. Ron	18.
El nia Movado kaj Agado		19.
Volas korespondi		20.



Lingvo Internacia

ISRAELA ESPERANTISTO

ORGANO de ESPERANTO - LIGO
EN ISRAELO

P.K. 39004, Tel Avivo
N-ro 65 - Julio 1978

Ĉefredaktoro:
Aleksander Manor
redaktoro:
Josef Ŝemer

ISRAELO - 30 jaroj de sendependeco

La establiĝo de la ŝtato Israelo en 1948 okazis en epoko, kiu travivas unu el la plej grandaj krizoj de la homaro. Eraso en kiu la malamo de homo al homo atingas sian kulminan punkton, valoroj estas piedpremitaj kaj ilian lokon okupas egoismaj intereso. La buŝo parolas pri "idealoj" kaj la mano tenas forte la pafilojn. La nomo de socialismo estis profanita kaj disvastiĝas spirita idolkulto.

Ni vivas en la jaroj en kiuj la homaro staras antaŭ la hamleta dilemo: "Ekzisti aŭ malaperi"?

En tiu ĉi epoko okazis la granda miraklo: la ekesto de Israelo. Israelo ne estas nur frukto de fizika heroeo sed ankaŭ la spirita fortstreĉo dum generacioj kaj ekzemplo de ideo kaj kredo, kiuj estas kapablaj ŝanĝi la destinton de nacio.

La establiĝo de Israelo deklaris malkaŝe al la tuta mondo kaj speciale al ĉiuj judaj generacioj batalintaj por gardi la judaĵon, ke iliaj sterto, aspiroj kaj suferoj ne estis vanaj. Ne vane judoj batalis kaj falis, ĉar ĉiuj iliaj ĝisnunaj malvenkoj transformiĝis en unu venkon.

Kaj tio estu nia konsolo!

Aleksander Manor

30 JAROJ DE ISRAELO : 1948-1978

La ŝtato Israelo estas fondita la 14-an de majo 1948 dum la sendependecmilito. Tio estis kroniĝo de longdaŭra enmigrado de la juda nacio al sia patrolando. La venko en la milito ebligis al la juna ŝtato labori por la realigo de vizio, kies ĉefaj trajtoj aperas en la ĉarto de sendependeco:

Juda enmigrado kaj ekzilkolekto.

Disvolviĝo de la lando por ĝia tuta enloĝantaro sur fundamentoj de libereco, justeco kaj paco.

Establi socion, en kiu regos socia kaj politika egalrajteco por ĉiuj civitanoj sen religia, rasa kaj genta diferenco.

Garntigi liberecon de religio, konscienco, lingvoedukado kaj kulturo.

Dum sia 30-jara ekzistado Israelo enradikiĝis en la regiono inter la popoloj kaj en la konscienco de ĉiu Judo en la mondo. Ĝi sukcesis realigi multajn el siaj celoj en la kampo de enmigrado, koloniĝo, ekonomio, kulturo, scienco, sekureco ktp.

En la establiĝtago de la ŝtato ĝi nombris 650.000 judojn kaj 156.000 minoritatanojn (ne judojn). En la fino de tiu jaro jam estis pli ol 750.000 judoj. En la fino de 1977 nombras la loĝantaro 3.680.000, inter ili 3.100.000 judoj kaj 580.000 ne judoj (en la malnovaj limoj).

La leĝo pri la reveno substrekas, ke "ĉiu judo havu la rajton veni al la lando, kaj ke la lando posedu la nacia-historian karakteron de ŝtato Israelo".

Tiu ĉi leĝo estas frukto de la longdaŭra nacia batalo por establi judan ŝtaton en Israellando.

En la jaro 1948 nur 35% de la juda loĝantaro estas naskitaj en Israellando kaj malpli ok 15% naskitaj en Azio kaj Afriko. Hodiaŭ estas preskaŭ 50% naskitaj en Israelo kaj ĉirkaŭ 25% en Azio kaj Afriko; la ceteraj en aliaj landoj. La loĝantaro de Israelo estas ĉefe urba (86%).

Kiel en aliaj multaj landoj en la mondo ankaŭ en Israelo la procezo de urbanigo daŭras. En ĝi la granda urbo havas pli grandan allogon. En 1948 estis en la lando malpli ol 10 urboj, kiuj nombris 10.000 loĝantoj kaj hodiaŭ estas jam 65 tiaj urboj, inter ili 8 urboj, kiuj enhavas pli ol 100.000 loĝantoj. (Jerusalemo - 370.000 loĝantojn kaj Tel Avivo - 348.000). En Hajfo estas 230.000 loĝantoj.

Post la unuiĝo de Jerusalemo en la jaro 1967 la urbo kreskis rapide dum en Tel Avivo restas la sama nombro de loĝantaro aŭ eĉ malpliigas. En la jaro 1975 Jerusalemo fariĝis plej granda urbo en la lando.

La ekonomio.

La plej gravaj ekonomiaj branĉoj de Israelo estas la terkulturo, industrio, domkonstruado, trafiko kaj turismo

Terkulturo:

Tiu ĉi branĉo estas la plej maljuna kaj progresema. Danke al ĝia nivelo kaj altaj atingoj laŭ internacia kriterio donas Israelo agrarajn sciojn al multaj landoj en la mondo. La agrara eksporto pligrandiĝis okfoje kaj la agrokulturo liveras pli ol 75% de la tuta bezono de la landa nutraĵo. Dum lastaj 30 jaroj fondiĝis 587 vilaĝoj kompare kun 231, kiuj ekzistis antaŭe.

Industrio:

La evoluo de industrio estis de la plej rapidaj en la mondo. La industria eksporto pligrandiĝis de 18 da milionoj dolaroj ĝis 2570 milionoj da dolaroj en la jaro 1977.

Turismo:

La turismo estas juna ekonomia branĉo, kiu evoluas dum la lastaj jaroj. La nombro de turistoj kreskas rapide.

En la jaro 1949 -22.000

1955 -50.000

1972 -728.000

En la jaro 1977 venis unu miliono da turistoj.

Kultura kaj socia evoluo:

Gazetoj: En Israelo aperas 24 ĉiutagaj gazetoj, la duono de ili en hebrea lingvo; 80 semajnaj gazetoj, 60 dusemajnaj gazetoj, 160 monataj revuoj kaj Israela Esperantisto kiu aperas 3-4 foje dum la jaro.


La alta edukado: En 1948 studadis en la universitatoj 1560 studentoj kaj en la jaro 1977 - 90.000. Israelo starasen la kvara loko en la mondo (post Usono, Kanado kaj Sovetio kaj antaŭ Francio kaj Anglio) laŭ la procento de la lernantoj en la universitatoj.

Sanservoj: La eventoj, kiuj okazis dum 30 jaroj en la sanservoj de Israelo estas senprecedencaj. Israelo estas nun inter tiuj ŝtatoj, en kiuj la nivelo de sanservoj estas plej alta: En la jaro 1948 estis nur 66 malsanulejoj kun 4600 litoj. En la jaro 1976 estis jam 140 malsanulejoj kun 24.500 litoj.

Israelo kaj la juda popolo:

Oni ne povas imagi al si la ekzistadon kaj evoluon de Israelo sen la granda helpo de la juda popolo. Israelo estas la ŝtato de la juda nacio kaj aperas kiel respondeca por la sorto kaj rajtoj de ĉiu judo en la mondo. En ĝia 30-a jaro de sendependeco strebas Israelo atingi veran pacon kun siaj najbaroj kaj daŭrigi la gloran judan historion.

A. M.



BAB-EL-VAD'

Ĥaim Guri

Al "Pordeg' de valo"
 Pilgrimas mi, senhalta.
 Ploras kamp-ŝakal',
 Blovetas mara vent';
 Grizas rok' bazalta,
 Nigras voj' asfalta,
 Super monto alta
 Klaras firmament'.

Bab-el-vad'! Memoru nin eterne, valo,
 Traluktintojn, savon al la Sankta urb'!
 Rustas tie niaj ostoj post batalo,
 Kun maŝin-skeletoj, sur la voja kurb'...
 Bab-el vad', memoru nin, griz-verda valo,
 Bab-el vad', sur voj' al Sankta urb'!

Sub la suna ard'
 Batalis tie gardo,
 Falĉis plumb-hazard',
 Mortpikis la ponard'.
 Lasta plend-rigardo,
 Fina kant' de bardo;
 Falis avangardo,
 Restis sed, standard'...

Bab-el-vad', memoru nin eterne valo...

Venos paca temp'
 Kaj floros ciklamenoj,
 Sur mont' dum printemp'
 Odoros gerani'.
 Sur batal-arenoj,
 Homoj, dum promenoj,
 Pensu pri postenoj,
 Kie falis ni! ...

Bab-el-vad'! Memoru nin eterne, valo...

"Bab-El-Vad'" - estas la araba nomo de "Ŝaar-ha-Gaj"; esperante: "Pordego de la valo"; la elirejo el la montaro en la valon Ajalon. Tie okazis la decidaj bataloj cele liberigi de araba sieĝo la urbon Jerusalemo en j. 1948.

La tradukinto permesis al si certan liberon, intencinte transdoni la spiriton de la versaĵo kaj ties ideon, pli ol ĝiajn vortojn.

La versaĵo de Ĥ. Guri fariĝis populara kanto laŭ muziko de S. Ferŝko, precipe kantata dum la funebroj pri la falintoj de la sendependeca milito.

trad. J. Kohen-Cedek



BAB-EL-VAD'


Vers. Ĥ. GURI

Muz.: Ŝ. FERŜKO

ANDANTE SOSTENUTO




AL "PORDEG' DE VAL'" PIL-GRI-MAS MI, SEN-HAL-TA.




PLU-RAS KAMPŜA-KAL', BLO-VE-TAS MA-RA VENT';



GRI-ZAS ROK' BA-ZAL-TA, NIG-RAS VOJ' AS-FAL-TA,



ŜU-PER MONTO AL-TA KLARAS FIRMA-MENT', BAB-EL-



VAD'! MEMO-RU NIN E-TER-NE, VA-LO, TRALUK-



TIN-TOJN SA-VON AL LA SANKTA URB'! RUSTAS



TI-E NI-AJ OS-TOJ POST BATALO, KUN MA-




ŜIN SKELE-TOJ, SUR LA VO-JA KURB'... BAB-EL-



VAD', ME-MORU NIN, GRIZVERDA VALO, BAB-EL-



VAD' SUR VOJ' AL SANKTA URB'!



6.

TRIDEK JAROJ DE ISRAELA SCIENCO KAJ TEKNOLOGIO.

Ne estas eble skribi en mallonga artikolo pri teknologiaj atingaĵoj de la lastaj 30 jaroj en iu ajn lando. Mi volas tamen informi pri solvoj de du, eble ne la ĉefaj, problemoj en la mondo, sed tamen problemoj, kiuj en estonteco havos sian pezon en daŭra evoluo.

Israelo ĉiam havis problemojn kun manko de la dolĉa akvo. Ĉiuj atingeblaj fontoj jam estas eluzitaj en Israelo kaj nuntempe nia problemo estas trovi vojon por ŝpari la akvon en agrikulturo kaj en teknologio. La katastrofo, kiu minacis al Israelo pro la manko de dolĉa akvo, estas por kelkaj jaroj forigita pro la efikaj metodoj por ŝpari la dolĉan akvon en agrikulturo. Tiu metodo tamen helpas nin nur dum la venontaj kelkaj jaroj kaj post ĝi ni ree staros antaŭ la problemo de akvo.

Pro tio ni nun laboras tre efike por akiri la akvon de la sola senlima fonto t.s. de la maro. La akvo de la maro estas sala, do ni devas ĝin sensaligi antaŭ iu ajn uzo en agrikulturo kaj teknologio.

La problemo de sensaligo de la akvo estas konata en la tuta mondo, kaj ĉiuj landoj povas aĉeti instalaĵojn, per kiuj oni povas produkti dolĉan akvon. La problemo tamen estas la prezo de tiu akvo kaj la kvanto de la energio (petrolo), kiun ni bezonas por tiu celo. Dum la tuta tempo de ekzisto de libera Israelo ni neniam ĉesis plibonigi la metodojn de sensaligo de akvo. Dum iu periodo ni uzis tre interesan metodon de sensaligo ne per destilado (vaporigo) de la akvo sed per ĝia glaciigo. Estas konata la fakto, ke la glacio de mara akvo ne enhavas salon. Oni povas glaciigi la akvon ne uzante tiom multe da energio, kiom oni bezonas por vaporigo. Lastatempe ni tamen revenis al la metodo de destilado. Tiu metodo, t.n. multgrada destilado kaj destilado sub tre alta premo, donas ŝparon de 40% da energio kompare kun similaj metodoj kiuj estas uzataj en la mondo. La afero havas specialan signifon, ĉar ni devas konkuri kun plej grandaj ŝtatoj, kiuj ankaŭ ne ŝparas monon kaj laboron kiu devos en estonteco solvi tiun ĉi neeviteblan problemon de la dolĉa akvo. Nun nia industrio eksportas diversmezurajn instalaĵojn por sensaligo tre sukcese, malgraŭ severa konkurado de pli grandaj ŝtatoj.

Nun ni konstruas grandan produktaĵon de la dolĉa akvo, kiu devas desaligi 400.000 tunojn de la dolĉa akvo ĉiutage. Se ni ĝis tiu tago havos atoman energiproduktaĵon, kiu povos doni al ni pli malmulte-kostan energion kaj varmon, kiu devas esti forigita de la atoma reaktoro, la problemo de dolĉa akvo verŝajne estos por ĉiam solvita.

7.

La alia teknologia sukceso estas atingita en la kampo de la tiel nomataj izotopoj. Ĝi apartenas al la problemo de atoma esploro. Jam antaŭ 30 jaroj en nia Vajcman Instituto oni komencis labori pri t.n. peza akvo. Peza akvo estas konata jam de la tempo de la dua mondmilito, kiam la norvegaj partizanoj sukcesis eksplodigi la germanan produktaĵon de la peza akvo en norvega fjordo. Tiu akvo estas bezona en grandaj kvantoj por la atoma reaktoro. Tiu peza akvo estas peza pro tio, ke ĝia hidrogeno, kies atoma pezo estas 1, estas anstataŭita per atomo de hidrogeno, kies pezo estas 2. Tiu peza akvo ne mankas en la mondo, ĉar ĉiuj atomaj potencoj devas ĝin pretigi por la militaj kaj industriaĵoj.

En Israelo, en supre nomata Vajcman Instituto, ni produktas alian pezan akvon. En tiu akvo ne hidrogeno estas pli peza, sed oksigeno. La kutima pezo de oksigeno estas 16, la pezo de oksigeno por la oksigena peza akvo devas esti 17, aŭ 18. La produktaĵo de tiu peza akvo estas procedo tre komplika. Sufiĉas diri, ke de la tempo kiam ni enigis la kutiman akvon en la tubojn de la produktaĵo ĝis ni ricevas la pezan akvon el ĝi pasas 7 jaroj. La prezo de tiu akvo estas pro tio tre alta, nekompareble pli alta ol la prezo de la oro. Ni nun uzas tiun pezan akvon nur por la sciencaj biologiaj kaj teknologiaj celoj. En biologio ni esploras eluzon de oksigeno per la vivantaj estaĵoj, en teknologio oni provas per ĝi kompreni pli bone la problemon de la rusto.

Nun ni produktas 95% de la monda bezono de tiu peza akvo. Ĝi tamen tute ne taŭgas por la militaj celoj. Ankaŭ en tiu kampo ni ne havas nun konkurencon.

H. Mašler

VIVNIVELO EN ISRAELO

Nenio pli bone respegulas la atingitaĵojn de la lando, kiel la vivnivelo de la civitanoj dum tiuj jaroj.

En la jaro 1948 estis en Israelo 650.000 judaj enloĝantoj. La nombro de ili pli ol kvarobligis. La multobligo devenas de enmigrado en sia plimulto kaj naskiĝoj. Plimulto de la novnigrintoj venis sen iu ajn havaĵo kaj mono, do preskaŭ ĉio, kion ili havas, estas akiraĵo de la lastaj 30 jaroj. La domoj, kiuj jam estis konstruitaj en la jaro 1948 estas nun nur malgrandaj insuletoj en la maro de novaj konstruaĵoj.

Se ni nun rigardas nuntempan kuirejon en la novaj domoj kaj komparas ĝin kun tiu de la jaro 1948 ni jam ne povas imagi, ke la homoj vivis en similaj kondiĉoj.

Ne ekzistas jam hodiaŭ primusoj, kiuj tiam estis la ĉefa ilo por kuiri kaj baki. Ne estis tiam elektraj fridujoj, sed ŝrankoj, en kiujn ĉiutage oni devis enŝovi grandan pecon da glacio. Neniu konis lavmaŝinon, televidon, En la jaro 1950, ni nomas ĝin jaro de la modesteco. En tiu jaro venis pli ol 200.000 judoj de ĉiuj flankoj de la mondo. La tuta nutraĵo estis dividata per talonoj. La enlanda terkulturado ne kovris eĉ 15% de la bezonoj. La knabo en Israelo ne sciis, kio estas pomo, tomato; eĉ terpomo estis raraĵo. En Israelo, kiu nun eksportas milionojn da kestoj de oranĝoj, tiam ili estis disvendataj laŭ talonoj unu kg. dum la monato. La ŝoseoj asfaltitaj estis nur malmultaj, kiujn konstruis Angloj dum sia regado por la militaj celoj. Nun ne estas preskaŭvilaĝo, kiun ne atingas moderna ŝoseo. Ĉiu vilaĝo havas nun elektran lumon, akvokondukilon, kuracistan helpon, ĉiu knabo lernas 9 jarojn senpage en la lernejo. (Nun la parlamento decidis, ke la tuta mezlernejo estos de la venonta jaro senpaga.) Ĉiu maljunulo ricevas ŝtatan pension, malaltan sed sufiĉan por vivi. Aperis multaj koncertejoj, kulturdomoj, junularaj centroj. La trafiko aŭtobusa atingas ĉiun punkton en Israelo kaj estas malmultekosta kompare kun simila en okcidenta mondo.

La aldona tabelo montras statistike, kiel evoluis nia lando dum tiuj jaroj. Oni devas rimarki, ke Israelo ricevas helpon de USONO kaj de okcidentlandaj judoj, sed tiu helpo eĉ en duono ne kovras niajn defendelspezojn.

	jaro 1950	1968	1977
kalorioj (en tago) de nutraĵo	2610	(tro multe)	3063
proteinoj (gramoj en tago)	32.2		50
fridujo (en familio)	0	85%	97%


jaro	1950	1961	1968	1977
lavmaŝinoj pro familio		10%	35%	70%
automobiloj	1%	4%	15.4%	27%
telefonoj			31%	54%
gasa kuirejo (aŭ elektra)			62%	96%

Interesa estas ankaŭ la tempo, kiun devis doni meza laboranto en Israelo por aĉeti iun de tiuj bezonaĵoj. (En la prezo oni ne povas doni klaran bildon, pro la senĉesa inflacio.)

por aĉeti fridujon la labor-	1950	1961,	1968,	1978
isto devis labori horojn:	1334	900,	527	386
lavmaŝinon:				322
3-ĉambranloĝejon: jarojn de la laboro			5.5	3.2
la aŭtomobilon			1.4	1.9
minutojn da laboro - ovo		2.6		1.1
blanka pano 750 gr.		7.4		3.2
butero 100 gr.		12.2		4.4

La statistiko montras nur plialtigon de prezo de aŭtomobiloj; ĝi montras, ke altiĝo de la prezoj tuŝas ĉefe la luksajn varojn kaj ne influas malfortajn tavolojn de la loĝantaro.

Interese estus kontroli, ĉu plialtiĝo de la vivnivelo donas ankaŭ senton de pli granda feliĉo. La demando restos ĉi tie sen respondo.



H. Maŝler



J E L I - angulo


NIA LANDO HAVAS TRIDEK JAROJN

Pri nia Lando estas multskribita,
longa poeziaĵ' pri ĝi verkita,
Ĉu mi povas renovigi ion?
Bedaŭrinde diras mi: "nenion".

Sed ĉe mi aperis kelkaj sentoj
Al ĝi skribi jenajn tiujn vortojn:
"Vi ja jam ne estas infanino,
Eĉ ne estas vi (ne plu) knabino,
Vi ne estu pli senspertulino,
Ĉar tridek jaroj estas vivo-peco,
Kaj vastprofundo por la estonteco".

Jes, eble multe estas jam skribita
Pri mia Lando, multe menciita
Sed al mi okazis pensadante,
ke skribhonoru ĝin mi Esperante.

Miriam Bukofcer



ALVOKO

al niaj junaj (fizike kaj spirite) legantoj!

Ni invitas vin sendi al ni anekdotojn, enigmojn kaj mallongajn distrajn rimajojn. Ni ĝojos aperigi la plej sukcesajn. Por la venonta numero ni planas publikigon de kvinliniaj rimajoj, (limerikoj). (חמשיריים)
"Poetoj" - Provu!

JELI - angululo.

D-RO IMANUEL OLSVANGER

(Okaze de la naŭdek-jara datreveno de lia naskiĝtago).

Naskiĝis en urbeto Grajevo, Litovujo, la 13.4.1888. Finis la studojn en Bern, Svislando, kiel etnologo kaj folkloristo. Lia disertacio temis pri "Funebraj moroj ĉe judoj". Li distingiĝis kiel lingvisto, poligloto, matematikisto kaj kosmografo. Kiel esperantisto de la unua varbperiodo, li persone konis la Majstron kun ties familio.

Elstara oratoro, li servis kiel propagandisto de cionismo, atinginte la direktoroficon de la Juda Nacia Land-rekonstrua Fonduso (Keren-Hajesod). En ĝia propagandservo li vojaĝadis tra multaj landoj de la juda diasporo, kie li diverslingve prelegis, preterokaze varbinte ankaŭ por Esperanto. Dum la vojaĝoj li konatiĝis kun multaj eminentaj personoj, kun kiuj li restis en amikaj rilatoj: interalie kun Nehru, A. Schweitzer, H. Hodler, Collinson, Otto Bujvid k.m.a.

Verkis kelkajn folkloristajn stud-esplorojn en diversaj lingvoj. Angle: "Contentions with God" (Cape Town; 1922). Jide: "Rozinkes mit mandlen" (Sekvinberoj kun migdaloj) (Bazelo; 1921 kaj 1931), kaj "Royte pomerantsen" ("Ruĝaj oranĝoj"; Berlino 1932 kaj New York 1968). La du lastaj jidlingvaj folkloraj kolektoj estis presitaj per latinaj literoj. Li ankaŭ verkis matematikan studverkon, aprobitan de kompetentaj specialistoj.

Im. Olsvanger estis brila poeto kaj multtalenta tradukisto. El la trezoro de la monda klasika literaturo li tradukis hebrean la ĉefverkon de Dante: "La diyina commedia" (pro ĝi ricevis la premion je la nomo de Ĉerniĥovski, la Dekameronon de Boccaĉio, la novelaron de Cervantes, japanan novelaron, "Platero i yo" de Yimenez, fragmentojn el la "Upaniŝadoj" kaj la "Bhagavad-Gita" (el sanskrito), hindan antologion kaj elektitan versaĵaron el Göthe.

Esperantlingve li verkis kelkajn kajerojn: "Hebrea progreso en Palestino" (prezentita al la XVII-a UK en Genevo, 1925, de la Centra Cionista Organizaĵo; Londono 1925), "Novaj homoj- novaj vojoj" (prezentita al la 18-a UK de Esperanto, 1926 en Edinburgo, de la centra Cionista Organizaĵo; Londono; 1926) kaj "La prestiĝo de la nacio" kaj ankaŭ bildkajeron pri la rekonstruo de Palestino.

Dum la Edinburga UK li faris grandan impreson, paroladante proze sed uzante la poezian manieron apostrofi: -Sinjor' Prezidant' de la Kongres' kaj estimata publik'... Li faris tion por elprovi eksperimente, kiel tio ĉi efektas, ĉar lia opinio, la troofteco de la finaĵo 0, faras tendan impreson. La Kongreso okazigis retorikan konkurson kaj d-ro Im. Olsvanger ricevis la premion.

Lia plej interesa esperanta verketo estas la verskolekto "Eterna Sopiro" (Vieno, 1925; Jerusalemo 1942), kies unuopaj versaĵoj antaŭe aperis sur la paĝoj de "Heroldo de Esperanto". La dua eldono, la jerusalema, fare de P.E.L. (Palestina Esper. Ligo), enhavis kroman poemon: "Inter Homo kaj Dio", en kiu la aŭtoro pritraktis en formo de leterinterŝanĝo kun Dio la eternajn problemojn pri Homo-Vivo-Universo-Dio. Ĝin li unue publicis en la jida lingvo, poste, pli vaste - en hebrea kaj fine - en Esperanto.

De la 1929-a j. estis d-ro Im. Olsvanger honora prezidanto de P.E.L. kaj ekde j. 1948-de E.L.I. (Esperanto-Ligo en Israelo).

Estis li altstatura, svelta kaj eleganta sinjoro kun matrazita, multesprima vizaĝo kaj multrimarkaj, saĝaj okuloj. Uzis nazpinĉilajn okulvitrojn kaj dandan promenbastonon, teninta konstante cigaredon en buŝangulo. Satis siĝi en kafejoj, ludi ŝakon, konversacii. Estis li homo kun vastaj universalaj penshorizontoj, humanaj ideokonceptoj, kun granda vivsperta saĝo kaj kun brila, akra spiritemo. Delonge antaŭvidis interplanedan flugkontakton. S. Ŝazar, la III-a ŝtatprezidento de Israelo, en sia verko: "Lumreflektoj el personecoj" ('אור אישי') dediĉis en ĝi unu ĉapitron al d-ro Im. Olsvanger.

Forpasis la 7-an de Febr. 1961. Funebraj kunvenoj okazis en kelkaj urboj de la lando. En Jerusalemo unu strato portas lian nomon.

J. Kohen Cedek


MIA PREĜO

Flugu forte, mia preĝo
Ĝis la alta Dia seĝo
Kaj obstine ne foriru,
Ĝis vi ĉion al Li diru.

Kaj se Lin vi trovos surda,-
Kun kuraĝ', kun tondro murda
Rompu vi la Di-orelojn,
Skuu krake la ĉielojn!

Ĉiujn ĝemojn de l' homaro
Havu Li sur la altaro,
Kaj de sang' kaj larmoj denso-
Jen por Li odorincenso!

Kaj se turnos Li la kapon,
Ĵetu vi post frapo frapon,
Rompu juĝajn seĝojn, tablojn,
Kaj alarmu la diablojn!




Devas vi kriega plendi:
 "Mi ne povas plu atendi!
 Sendu tuje Viajn benojn.
 Solvu homajn kor-katenojn!"

Skuu krake ĉiujn mondojn,
 Malmovigu sunajn rondojn!
 Lin devigos mi obei,
 Aŭ mi Lin malhelpos krei!

Sed se vi kun man' malplena
 Venos de l' ĉielo bena,-
 Mortu mia korpo nigra
 En dolorturmento tigra!

Immanuel Olsvanger



ARMILARO DE ARABOJ

Oni en certaj rondoj multe rakontas pri la israela "imperismo". La afero estus tre malgaja, se ĝi ne estus samtempe ridinda. La imperismo de Israelo staras kontraŭ la pacemaj arabaj ŝtatoj. Sed... Arabaj ŝtatoj ĉirkaŭantaj Israelon aĉetis de la jaro 1977 armilojn por 35 miliardoj da dol. (en USONO: bilionoj). La armilojn ili ricevos ĝis la jaro 1980. Nur Saŭdia Arabio pagis por la armiloj 24 miliardojn da dol. La kvanto de la armiloj kiun ĝi ricevos povas esti sufiĉa por la tuta Afriko kaj parto de eŭropaj landoj, kiel Germanio, Francio, Nederlando, Belgio kaj Norvegio. De la jaro 1972 la forto de Saŭdio pligrandiĝis 10-foje. Saŭdio havas loĝantaron nur 6 milionojn, do la armiloj aĉetitaj ne povas de ĝi esti eluzataj, Saŭdio fariĝas la plej granda arsenalo por la tuta araba mondo. Samtempe Saŭdio ne havas iun konkretan malamikon, neniu minacas ĝin kaj ĝi certe havos helpon en la kazo de milito de la flanko de USONO. La Instituto por Strategiaj Esploroj en Stokholmo sciigas, ke la nombro de la arabaj soldatoj estas pli granda ol la nombro de la soldataro de NATO je 500.000 soldatoj. La nombro de kanonoj estas trioble pli granda ol la nombro de la kanonoj de NATO kaj la nombro de tankoj estas je 3000 pli granda. Nur la soldatoj de t.n. orienta parto de la arabaj landoj: Sirio, Irako, Jordanio kaj Saŭdio havas nombron de soldatoj kaj de tankoj pli grandan ol de NATO kaj la nombro de la kanonoj duoble pli grandan. Kiam en la jaro 1980 USONO finos la liveron de la aviadiloj al Saŭdio kaj al aliaj arabaj landoj la aera forto de ili estos duobla ol de NATO, egala al la fortoj de la Varsovia Pakto kaj trioble pli granda ol tiu de Ĉinio.

El la vortoj de amb. Hercog en UNO
 pret. H.M.

LA FLAŬRO DE ISRAELLANDO

Nia flaŭro estas inter la plej interesaj kaj plej variaj kompare al tiu de ĉiu ajn lando.

"Lando de tritiko kaj hordeo kaj vinberoj kaj figarboj kaj granatarboj, lando de olivarboj kaj mielo", diras la Biblio. Multo estas aldonita al tio ĉi, inkluzive bananojn, oranĝojn kaj aliajn citrusfruktojn, por kiuj la marborda regiono ("Borda Ebenajo"), estante akvumita, ofertas la tutmonde plej favoran kombinaĵon de grundo kaj sunbrilo.

Falfoliaj fruktarboj kreskas ĉie, sed ĉefe en la malvarmetklimataj montetoj; daktiloj, bananoj, avokado, gujavujoj kaj mangoarboj - en la varma Jordan-Valo kaj Borda Ebenajo.

Apud la bazaj grenoj kaj legomoj kreskas la tabako; kotono, ternuksoj kaj sukerbetoj estas plensukcese enkondukitaj en relative vasta amplekso.


Indiĝenaj arboj inkluzivas la jerusaleman pinon, la tamarikon kaj la karobarbon, kiuj estas vaste uzataj en arbarigo. Eŭkalipto-arbojn oni plantis multnombro dum la pasinta jarcento; antaŭnelonge estas plantitaj pinarboj en la montoj kaj akacioj en la vastaj dunoj de la suda regiono, Negev.


La lando estas riĉa je medicinaj herboj kaj sovaĝaj floroj. Jam en monato decembro eĉ en la montoj floras la hiacintoj, krokusoj kaj narcisoj; sekvas ilin la anemonoj, tulipoj, ciklamenoj, irisoj, lekantoj kaj multaj aliaj floroj. Hortikulturo (kultivado de plantoj kaj arboj, precipe ĝardenaj, libere kaj subvitre) disvolviĝas ĉiujare vaste en oranĝerioj (plantvarmejoj) en multaj vilaĝoj ofertantaj al la enlanda kaj eksterlandaj merkatoj milionojn da floroj, precipe rozojn, gladiolojn, tulipojn kaj krikantemojn. Fruktarboj floras jam en januaro kaj de tiam ĝis aprilo la deklivoj de la montaro Karmel abundas je koloroj kaj bonodoroj.

Mirinde estas, ke en la Biblia epoko granda parto de la Lando Israelo estis kovrata de arbaroj. En la lastaj jarcentoj kaj ĉefe dum mezepoko multaj arbaroj ruiĝis de la nomadoj kaj iliaj kaprinoj kaj aliaj de la Turkoj, kiuj eluzis la arbojn, kiel brulaĵon por siaj armeaj trajnoj.

Tial okazas en Israelo en la lastaj jardekoj larĝa ampleksa arbariga laboro. El la antikvaj arbaroj nur tre malmultaj restis ĝis nun, ĉefe en la norda parto, Galileo. Plimulto de la nunaj arbaroj estas plantitaj en nia generacio. En 1948 estis 4 milionoj da arboj. Hodiaŭ ilia nombro atingis jam pli ol 100 milionoj.

Josef Šemer





Ŝimŝon Melcer (1908 -)
Tluste (Pollando) -
nun en Tel Aviv.
Poeto kaj tradukisto.

JUGVERDIKTO


(Popollegendo)
trad. libera.


Bonfamis juĝofara en Berdiĉev', raben'
Levi' -Iĉhak' ben-Sara, kun Dia help' kaj ben'.
Ĉar ĉiujn, kiuj plendis je viv'-malbon' kaj krud'
Li juĝis kaj defendis, laŭ leĝoj de Talmud'.
Jen fôje kun postulo de juĝo pro vivĝen',
Aperis mizerulo kun plend' ĉe la raben'.
Kaj diris dum alveno kun ploro kaj impet':
-"Ho, sankta moŝt', rabeno, pri savo estas pet";
"Mi venis kun deklaro, invit' al juĝproces',
Ĉar mia infanaro malsatas sen neces'."
-"Al kiu la invito al juĝo kontraŭ vi?"-
Demandis sen hezito raben' (kaj sen devi').
Respondis vir' sentima: -"Vi voku, sen apel',
"Al juĝo legitima la Dion el ĉiel'!"...
-"Prezentu,"- diris ruze raben', kun inĝeni',-
"La faktojn vi, akuze, por ke verdiktu ni."
Al rabbi, kun amaro malfermis buŝon li:
Malsatas infanaro kun tuta famili';
"En dom', ĉar mankas, fakte, eĉ pana krust', legom',
"Eĉ guto de la lakto, eĉ ŝelo de terpom'.
"Se mi, pekul', malĉastas, Di' punu min pro pek'
"Sed kial vane fastas la geinfanoj, dek?
"Mi juston kaj ne vanton postulas,- jen la ĵur'! ..."
Raben' tuj folianton konsultas de la ĵur'.
"Ho, Di' ĉu Ci dementas?" -aŭdigis lia dir',-
"Ci kial prisilentas? Ĉar pravas tiu vir'!
"Respondu, Plejpotenca, benata estu Ci!
"Apelu kvintesence je la reklamaci'.
"Ĉar se Ci apatie silentas pri l' delikt',
"Decidos senpartie mi tuj pri la verdikt'.
"Ĉar tekstas en leĝnoto: *Pro la gepatra pek'
"Ne estu fil' punota kaj same nepo, nek!*

"Jen Di' pri Ci kritikiko
"Kun la riproĉ-indiko
"De la verdikt' kopio,
"Jen por plendint', kun pio,
Transskribis ĝin rabeno
Jen tekst' sur pergameno
"Ad... ad majorem Dei,
""Di' devas ŝatobei
"Laŭ ĝi Di' ŝuldadas donon
"Por pan' sufiĉan monon,
"Por peco da viando,
"Eĉ por infana frando,
"Subskrib' sur juĝdeklaro:
"Levi'-Iĉhak' Ben Sara,
La mizerulo prenis
Kun danko sin fortrenis,
Ĉar timis, ke rabeno
Do, estas hejmeveno
De strat' al strat' alia
En man' l' atest' folia
Subite, per la vento
Leviĝis ĝis tegmento,
Sed jen, post iom falis,
Pelite ĝi spiralis
L' ateston vir' postkuris
Kun la venteg' konkuris
Jen estis ĝi apude,
Sed jen forflugis lude,
Forblovis ĝin la vento
Tre stranga misevento
Sed jen kapteble haltis
Kun ĝoj' la vir' ensaltis,
Plenplena kest' da oro,
Plejriĉa montrezoro
Jen tiel la ĉielo
Plenumis sen ŝancelo
Ferrestu adorata
La nom' de Di' benata,

de Juĝa Tribunal',
en Juĝa Tagĵurnal'.
reskrib' sur pergamen',
kun Dia help', amen'!"
sub kandelinga lum'.
de la rabena plum':
eterna glor' al Li!-
leĝaron de Bibli'.
al infanar' de l' hom'
por lakto kaj legom',
por ĉia vivbezono',
konklude laŭ rezono'.
la tribunala ĉef',-
rabeno de Berdiĉev'.
folion de l' decid',
foriris kun rapid'.
pripentus pri l' afer',-
por li ag' de prefer'.
rapidis mizerul',
kun la verdikt'-formul'.
kaptita la foli'
altiĝis pli kaj pli.
alflugis ĝis la ter',
pro ŝtorma vent' veter'.
Ĉasadis ĝin sen ĉes',
sen signo de sukces'.
jen preskaŭ ĉe la man',
perdita talisman'.
al malproksim' de li...
okazis al foli'.
ĉe kavo la atest'
ekvidis, - estas kest'!
plenplena da arĝent';
trovita dank' al vent'!
obeis la verdikt'.
ĝin laŭ rabena dikt'.
memor' pri li, kun ben',
Levi'-Iĉhak', amen'!

Trad. el la hebrea J. Kohen-Cedek





KULINARA ANGULO

"kaj vi manĝos kaj estos sata" (Readmono, 11,15)

Ĉio kion vi volas scii pri... terpomoj.

La terpomo estas malnova amiko, konata kaj ŝatata. Pli precize - ek de la jaro 1537, kiam ĝi estas malkovrita en Ameriko, en indiana vilaĝo, de trupo de hispanaj soldatoj serĉantaj oron. Oron ili ne trovis, sed ilia eltrovo estas sendube multoble pli altvalora ol ĉiu ajn oro, ĉar ek de tiam la terpomo servas kiel unu el la plej gravaj fontoj por livero de karbonhidratoj.

En la komenco ĝi estis konsiderata, kiel manĝaĵo de riĉuloj, sed dum la sekvintaj jaroj la terpomo fariĝis tre populara. Hodiaŭ ĝi kaptas tre gravan lokon en la ĉiutaga menuo en plimulto de la mondpartoj.

Krom granda enhavo de fero en la terpomo troviĝas mineraloj-kaliaj, fosporaj kaj kalciaj saloj.

La kvanto de la natrio en la terpomo estas eta, tial ĝi estas taŭga por dieto de malsanuloj suferantaj pro alta sangpremo aŭ diversaj kormalsanoj. Dank' al malmulteco de la celulozo kaj de la graso, la terpomoj estas facile digesteblaj kaj ili taŭgas bone por leĝera dieto.

Kalorie - mezgranda terpomo kuirita aŭ bakita (ĉ. 100 gr.) liveras nur ĉirkaŭ 80 kalorioj. (Se la terpomo estas fritita, tiam la oleo liveras multe pli da kalorioj, kompreneble...)

Resume, ĉar la terpomo ne liveras multe da kalorioj kaj pro la fakto, ke ĝi estas ege satiga kaj kontentigas la manĝodeziron sen troŝarĝi la stomakon, ĝi servas do kiel unu el la plej gravaj elementoj de la maldikiĝa dieto (1200 kalorioj) en la diversaj landoj (Usono, Britio).

Recepto: Kuko de terpomoj (6 porcioj).

Ingrediencoj: 1 1/2 kilogramoj da terpomoj, 2 Mezgrandaj bulboj, 2-3 kuleroj da kokina graso aŭ margarino, 4 ovoj, 4 kuleroj da faruno, salo, pipro.

Indikoj: 1. Senŝeligu la terpomojn kaj dispremu ilin per kruda raspilo.

2. Fritu en la graso la bulbon, post kiam vi distranĉos ĝin.

3. Aldonu la bulbon al la terpomoj; krome kunaldonu ankaŭ la ovojn kaj la farunon.

4. Kirllu ĉion kaj spicu laŭ gusto.

5. Enverŝu la kirllaĵon en bone oleitan bakujon.

6. Baku ĝis kiam la kuko bruniĝos kaj iĝos krusta.

7. Bonan apetiton!

Magiisto (Trad. J.Ŝ.)



VORTARETO (kombinata)

Averto: la esperanta-hebrea parto estas serioza; la esp.-esp.ne estas serioza...

<u>dueto-</u>	דואט, דוּזמר	du infanoj
<u>etaĝo-</u>	קומה	infaneco
<u>informado-</u>	מסירה מידע	"Kaj Dio la Eternulo konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon" (Genezo 2).
<u>legendo-</u>	אגדה	bonega libro
<u>margeno-</u>	שוליים	ŝtormo (laŭ la maristoj)
<u>martiro -</u>	קדוש מעונה	logaĵo de ŝipanoj
<u>matadoro-</u>	לוחם שוורים	tutnatura inklino de hejmaj katoj
<u>monotona-</u>	מונטוני, חדגוני	havanta altvaloran tonon...
<u>muskato-</u>	אגוז בושם	muso kun kato, ĉu ili povas kunesti?
<u>oksid-</u>	תחמוצת	kiam nur 8 komitatanoj ĉeestas la kunsidon
<u>okulo-</u>	עין	ĉiu el la partoprenantoj de la oksido
<u>proteino-</u>	פרוטאין, חלבון	kulpe de la gejšo
<u>salamo-</u>	סלמי, (סוג נקניק)	Verŝajna inklino de certa kuiristo
<u>sublima-</u>	נשגב	troviĝanta ankoraŭ antaŭ la fina punkto de sia povo
<u>Sudano-</u>	סודן (מדינה באפריקה)	loganto de Ejlat, ekz.
<u>tempesto-</u>	סופה	slogano de maldiligentularo
<u>turkiso-</u>	אבן טורקז	tuŝo de la lipoj por esprimi amon aŭ respekton - sed nur kiam ĝi okazas sur la tegmento de Salom-Turo
<u>tropika-</u>	טרופי	rilata al moskito
<u>vespero-</u>	ערב	organo de vespo (צירעה)
<u>vesperto-</u>	עטלף	malbona travivaĵo
<u>turniro-</u>	טורניר, התחרות בין קבוצות	moviĝo ĉirkaŭ sia akso




J. Ŝemer

TRO-PIKA



MAT-ADORO



ESPERANTO-KURSO EN MEZLERNEJO KUGEL, HOLON

En septembro 1977 mi komencis gvidi kurson de Esperanto en Holon, urbo proksima al Tel Avivo. Mi ricevis la rajton iri de klaso al klaso kaj propagandi Esperanton, en ĉiu klaso dum dudek minutoj. Devis esti du grupoj de lernantoj de la naŭaj klasoj (aĝo 14) kaj de la dekaj klasoj (aĝo 15). La sukceso de la informado estis sufiĉe granda. Enskribiĝis por la kurso 50 lernantoj - 30 de la naŭaj klasoj kaj 20 de la dekaj.


Esperanto fariĝis tre populara en la lernejo; eĉ la direktoro aĉetis unu libron por si. La gazeto de lernantoj intervjuis min kaj publikigis artikolon pri Esp. Ankaŭ unu el miaj lernantinoj publikigis artikolon pri Esp. Alia rakontis, ke ŝi lernas la internacian lingvon kune kun sia patrino. Alia diris, ke ŝi instruis kelkajn najbarinojn. Mi instruis laŭ la libro de Leo Turno, adaptita de d-ro Maŝler por hebree parolantaj lernantoj. Al tiu ĉi libro d-ro Maŝler aldonis broŝureton, ĉar la libro estas tro malfacila por la komencantoj, ne parolantaj la eŭropajn lingvojn. La libro ne estas perfekta, ĝi ne estas laŭgrada kaj uzas por ĉiu nova leciono tro multe da novaj vortoj. Mankas en ĝi materialo por ĉiutaga konversacio. Bone estus, se en ĉiu leciono estus nur dek novaj vortoj. Mi preferus instrui laŭ ĉeh metodo, sed mi ne povis ricevi tiun libron.

Jam post kelkaj lecionoj la lernantoj komencis rakonti kaj paroli. La plej parolemaj estis filino de polandaj gepatroj, sudamerikanino kaj filino de rumane parolantaj gepatroj. Sed ankaŭ inter jemenidinoj estis kelkaj tre bonaj kaj diligentaj lernantinoj. Ni lernis unufoje semajne, ĉiu grupo po du horoj.

Dum la lecionoj vizitis nin tri samideanoj. Juna usonano, gasto de Germanio (turisto) kaj J. Semer. J. S. estis tre aktiva vizitanto: Parolis esperante, kantigis la lernantojn. Kelkaj lernantinoj komencis viziti la kunvenojn de JELI. Post la fino de la 2 unuaj trimestroj okazis skribaj ekzamenoj. La malaltiĝo de fervoro okazis dum la tria trimestro, ĉar la lernantoj prepariĝis por la finaj ekzamenoj.

Mi tamen kredas, ke ne ĉiuj semoj perdiĝos kaj el tiuj klasoj eliros ioma nombro de bonaj esperantistoj.

Aŝer Ron



KLUBAJ VESPEROJ

Amuza rakonto pri Danlando
La suna energio (partoj II, III,)
Landa jarkonferenco
La paco kaj la Biblio
Humuraĵoj
30 jaroj de sendependeco
Humuraĵoj
Turkujo kaj la Judoj
Mia korespondado
Kiu kreis Esperanton?

E. Haroun
R. Berlinerblau

R. Kleiman
R. Alberg
A. Manor
H. Maŝler
M. Braña
E. Haroun
J. Murĵan

Someraj ferioj

Dum aŭgusto nia klubejo estos fermata. Preskaŭ tuta nia agado ĉesas. Pro tio ni memorigas al vi, ke tuj post la aŭtunaj festotagoj komenciĝos novaj kursoj en Tel Avivo kaj eble en aliaj urboj. Bonvolu informi ĉiujn, kiuj interesiĝas pri Esperanto kaj ankaŭ tiujn, kiuj ne scias kio estas Esperanto, pri ĝi. Bonvolu informi ilin, ke Esperanto troviĝas en la telefon-libro en Tel Aviv sub sia plena nomo: 240-459. La estraro de ELI deziras al vi agrablajn feriojn kaj ree renkontiĝon tuj post la ferioj.

KURSOJ

En Tel Avivo kaj la ĉirkaŭaĵo daŭras komencitaj ĉi-jare kursoj:

En la Junulara Domo, kiel kutime, estas du kursoj, kiujn gvidas J. Murĵan kaj d-ro H. Maŝler. Ili gvidas ankaŭ la kurson por progresantoj en la klubejo. En la gimnazio Kugel en Holon finiĝas la kurso komencita en oktobro. La detaloj pri tiu kurso-en alia loko de la revuo.

La kurson gvidas A. Ron.

En Natanio daŭras la kurso de s-anino D. Ŝor kaj en Kfar Saba-de J. Giladi. La koresponda kurso senĉese daŭras.

KARAJ GESAMIDEANOJ

Nia kotizo - 50 IL por la jaro - estas tre malalta kompare kun la elspezoj, kiujn ni havas por propagandi kaj gvidi kursojn, eldoni la revuon, pagi kotizon al UEA (ELI estas membro de UEA), elspezi milojn da IL por nia tre abunda poŝto, eldoni lernolibrojn, informilojn, presigi korespondan kurson. Se vi volas, ke nia movado daŭre kresku, pagu vian kotizon. En la bulteno estas aldonita ĉeko. ELI estus dankema, se vi donacus ion pli por la movado. Pri la donacoj pli altaj ol 100 IL sciigas nia bulteno.

DO?

DONACOJ

Michael Larkin 20 US dol.
Lev Jaakov

333 IL
100 IL

ANONCOSEMAJNO (internacia magazino sendependa)

Tuj aĉetu ĵus aperintan numeron 'nul' de s.n. revuo! -
La unua kaj unika aktuala semajna revuo en la internacia
lingvo, kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj.
Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu me-
dio. Konvinkiĝu mem! Vi ricevas numeron 'nul' de SEMAJNO
kontraŭ pago al poŝtĉekkonto Nbg 65092-858 (S. Maul,
Semajno, Augsburg) aŭ Bayer. Vereinsbank Augsburg
(bank-n-ro 720 200 70) n-ro 8120900 (Verlag S. Maul,
Semajno) aŭ sendo de 4 internaciaj respondkuponoj (nur
el nepagipovaj landoj!) al S. Maul, Semajno, Singerstr.
1/III, D-8900 Augsburg, FR Germanio. Grupoj ĝuas raba-
ton de 10% ĉe mendo de pli ol 5 ekzempleroj! Suskripcia
kampanjo nur ĝis meze de decembro 1978! Klare skribu
vian adreson.

VOLAS KORESPONDI

S-ro Emil Hanhiniemi, P.O. Box 764, Ingham, Queensland,
Aŭstralia 4850, volas kontakti kun Isr. Esp. kaj inter-
ŝanĝi literaturon.

S-ro Krzysztof Cywinski, Lublin, ul. Mickiewicza 23, Polska
(Polio) kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Richard Wiman, 4985 Holladay Boulevard, Salt Lake City, U.S.A.
19 jara. interesita pri lingvoj, muziko, poezio, historio,
sporto (futbalo kaj glacia hokeo) kaj naturalismo. Li es-
tas de sveda-amerika deveno.

S-ro Félix Martin Triep, Doctor Alcay, 12.3º G, Zaragoza-6
Hispanio, kolektas poŝtmarkojn, neuzitajn seriojn, povas
sendi kolekton de faŭno pri fiŝoj. Interesiĝas pri arto-
pentraĵo, faŭno, flaŭro, sporto kaj kosmo.

J. A. Hippe, , Van Meelstraat 82, Beverwijk, Nederland.
edziĝinta, pri politiko, sindikatmovado, abstinenteo
kaj humanismo.

John Brady, 8 Holyrood, Crescent, Glasgow, Skotlando,
Britujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kaj Esperanto-
glumarkojn.